

SKIZOJ EL LA HISTORIO DE ESPERANTO

LINGWE UNIVERSALA — BJELOSTOKO — LA UNUA LIBRETO

En pasinta jaro jubilea estis eldonitaj kelkaj verkoj pri historio de nia lingvo kaj movado, el kiuj nia nuna esperantistaro povas bone kompreni ĉion, kio okazis post la jaro 1887, en kiu estis eldonita la unua libro kun la mondkonata titolo: D-ro Esperanto. Internacia Lingvo. Antaŭparolo kaj Plena lernolibro.

En ĉiuj ĉi nomitaj historiaj verkoj oni trovas tre mal multe pri la antaŭhistorio de nia lingvo, escepte nur citaĵojn el la fama Zamenhofa letero al N. Borovko, konata sub la nomo: Letero pri la deveno de Esperanto.

Ŝajnas, ke ne estas eble aldoni ion al ĉi tiu periodo de nia lingvo, kiam ĝi estis efektive tute privata afero de aŭtoro de Esperanto; tamen se oni la leteron funde pristudas, oni trovas multajn interesajn punktojn, kiuj estas vere indaj, por ke oni kun ili pli profunde konatiĝu.

Unu el ĉi tiuj interesaj punktoj en ĉi tiu grava, historia dokumento estas tiu, kiu rilatas al la evoluo de nia lingvo.

Ne estas eble sekvi la tutan psikologian proceson, el kiu elkreskis la lingvo tia, kia ĝi prezentigas en la „Unua libro“, sed en certa tempo t. e. en la jaro 1878 (do naŭ jarojn antaŭ la jaro, en kiu aperis Unua libro) nia lingvo jam atingis tian staton, ke hodiaŭ oni povas konstrui al si pri ĝi almenaŭ versimilan bildon.

La lingvo havis tiam ne nur sian apartan nomon „Lingwe uniwersala“, sed ĝi posedis eĉ ian literaturon, ĉar laŭ la letero al Borovko „sur la tablo, krom la gramatiko kaj vortaro, kuŝis kelkaj tradukoj en la nova lingvo“. La 5-an de decembro la junaj adeptoj de la lingvo, okaze de ĝia kvazaŭ publika naskiĝtago, kantis eĉ jam himnon, kies komencaj vortoj al ni estis konservitaj, kaj kiuj estas nun la sola fonto, el kiu oni povas sin almenaŭ parte informi pri la strukturo de nia tiam antaŭesperanto.

La nomita strofo estas:

Malamikete de las nacjes,
Kadó, kadó, jam temp' está!
La tot' homoze in familje
Konunigare so debá!

(En nuna Esperanto tio ĉi signifas: Malamikeco de la nacioj falu, falu, jam tempo estas! La tuta homaro en familion unuigi devas.)

La „Lingwe uniwersala“ estis certe skribita per latinaj literoj, sed anstataŭ nia simpla *v* estis uzata duobla *w*. Krom mallongaj vokaloj ekzistis ankaŭ vokaloj longaj, kun streketo super la koncerna vokalo, *ó*, *á*, kiel ekz. en vortoj *kadó*, *está*, *debá*, kaj versimile (kiel ni pli poste pruvos) ankaŭ *é*, *í*, *ú*.

La finiĝo de substantivoj estis mallonga *e* (*lingwe*, *nacje*, *familje*), kiu povis esti anstataŭata per apostrofo, kiel okazas ankaŭ nun ĉe substantiva finiĝo *o*.

Ekz.: *home* (homo) hom'
tempe (tempo) temp'
amike (amiko) amik'.

Por la multenombro oni aldonis konsonanton *s*.

Ekz.: *nacje* — *nacjes*
home — *homes*.

Akuzativo estis la sama kiel nominativo, kion ni sciiĝas laŭ tria verso en vorto *familje*, kie laŭ nia nuna pensmaniero devus nepre esti uzata akuzativo. Genitivo estis esprimata per helpo de prepozicio *de*, sed por dativo ni havas neniajn dokumentojn. Artikolo estis kiel nun *la*, sed havis ankaŭ multenombrian formon *las*; simile kelkaj plej

malnovaj nespertaj esperantistoj uzis multnombrian formon por nia neŝanĝebla *la* — *laj*.

Alia pruvo, ke ne ekzistis akuzativo estas la pronomo *so*, kiu ne povas esti akuzativo.

Laŭ ĉi tiu pronomo *so*, personaj pronomoj posedis finiĝon *o* (eble *mo*, *vo*, *so*, *ono*) k.t.p.

Infinitivo de la verboj estis formata per finiĝo *are*, kiel en vorto „konunigare“.

Ekz. *debare* (devi), *estare* (esti), *kadare* (fali). La tempo estanta havis finiĝon *á*, *vo está* (vi estas), *vo debá* (vi devas); la modo ordona finiĝon *ó*, *kadó* (falu), *estó* (estu).

Per analogio la ceteraj tempoj kaj modoj havis finiĝojn *i*, *é*, *ú*.

La adjektivo havis finiĝon *a*, kiel oni vidas en vorto *uniwersala* (*lingwe uniwersala*). Adjektiva finiĝo *a* povis esti anstataŭata per apostrofo. Ekzemple: *Totá homoze* (tot' homoze).

La finiĝo de adverboj estas duba, tamen ĉar la finiĝo de substantivoj estis *e*, la finiĝo de adjektivoj *a*, kaj la finiĝo de pronomoj *o*, oni povas supozi, ke la finiĝo de adverboj estis *i* aŭ *u*.

El numeraloj restis nur *un* en la kunmetita verbo *kon-un-ig-are*.

El afiksoj restis *mal* (esp. mal) en vorto *mal-amikete*, *kon* (esp. kun) en vorto *kon-unigare*. *Kon* povas esti versimile uzata kiel prepozicio (*kon malamike*), simile prepozicio *in* (*in familje*) povas esti uzata kiel prefikso.

Laŭ tio ni povus konstrui kelkajn kunmetitajn vortojn:

Kadare (fali) *inkadare* (enfali)
Estaré (esti) *konestare* (kunesti).

El sufiksoj restis:

et (nuna *ec*) *amik-et-e* (amik-ec-o)
oz (nuna *ar*) *hom-oz-e* (hom-ar-o)
ig (nuna *ig*) *un-ig-are* (unu-ig-i).

Internaciaj vortoj kun finiĝo *io* (nacio, familio) estis universaligitaj per finiĝo *je*. Ekz.: *Familje* (familio), *nacje* (nacio).

Sekvas malgranda provo en *Lingwe uniwersala*. (Vortoj en parentezoj estas dubaj): *Homes debá studare la lingwe uniwersala (se ono) volá perfektu (aŭ perfekti) konare la tota evolucje de lingwe Esperanto (kiu) está la una, kompleta lingwe, (kiu) konunigá las nacjes de la tota homoze in un familje*.

* * *

Ĉiu studaĵo pri historio de Esperanto devus nature komenci per desegnado de la personeco de ĝia aŭtoro, D-ro L. L. Zamenhof, per priskribado de detaloj el lia vivo, per rakontado de ĉio, kio estas aŭ ŝajnas esti necesa por konstruo de la bildo de l' vivo, kiu estis komence, kaj ankoraŭ estas, centro de nia tutmonda movado.

Mi tamen tion ĉi ne faras, unue tial, ĉar ni jam posedas historiajn verkojn, kie oni ĉion koncernantan trovas, due kaj ĉefe tial, ĉar ni posedas en ĉi tiu rilato klarigan dokumenton, devenantan el la plumo de la Majstro mem, lian mondkonatan leteron al N. Borovko, nomatan „Letero pri la deveno de Esperanto“.

Ne estante kapabla aldoni ion pli detalan kaj pli novan al ĉi tiu grava dokumento, mi decidis anstataŭ la bildo de nia Majstro konstrui la bildon de la medio, en kiu li kaj

lia verko elkreskiĉon, medio, sen kies influo nia movado estas preskaŭ neklarigebla.

„Mi naskiĝis en Bjelostoko (3/15 decembro 1859) gub. de Grodno (en Polujo)“, skribas la Majstro en menciita letero. „Tiu ĉi loko de mia naskiĝo“, li daŭrigas, „kaj de miaj infanaj jaroj donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj. En Bjelostoko la loĝantaro konsistas el kvar diversaj elementoj: Rusoj, Poloj, Germanoj kaj Hebreoj. Ĉiu el tiuj ĉi elementoj parolas apartan lingvon kaj neamike rilatas la aliajn elementojn.“

En tia urbo pli ol ie la impresema naturo sentas la multepezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikajn partojn.“

Kian gradon tiu ĉi diverseco kaj intergenta malamikeco en kelkaj jaroj poste atingis, tion per kortuŝantaj vortoj pentras la Majstro en sia Geneva parolado en jaro 1906.

„Naturaj filoj“, li diras, „de sama lando ĵetas sin kiel kruelaj bestoj kontraŭ la tiel same naturaj filoj de tiu sama lando nur tial, ĉar ili apartenas al alia gento.“

Kaj kelkajn liniojn poste: „En la stratoj de mia malfeliĉa urbo de naskiĝo sovaĝaj homoj kun hakiloj kaj feraj stangoj sin ĵetas kiel plej kruelaj bestoj kontraŭ trankvilaj loĝantoj, kies tuta kulpo konsistis nur en tio, ke ili parolis alian lingvon kaj havis alian gentan religion, ol tiuj ĉi sovaĝuloj.“

Apartenante per sia deveno, religio kaj koro al du el plej malfeliĉaj gentoj en Rusujo, al gentoj hebrea kaj pola, li kun sia impresema animo multe pli ol aliaj devís senti la nenaturan kaj preskaŭ nehuman staton intergentan, li kun sia delikata edukiteco kaj instruiteco devis multe pli ol aliaj pripensadi pri ĉi tiu homa perverseco, ĉar per siaj propraj okuloj li vidis „kiel terure altaj kaj dikaj estas la interpolaj muroj.“

Ŝajnas, ke estas preskaŭ natura fenomeno, ke realigo de malnova jam ideo de lingvo internacia kun ĉiuj ĝiaj sekvoj devis okazi en tiel malfeliĉa medio, kia certe estas Polujo, kun siaj ambaŭ gentoj, Poloj kaj Hebreoj.

Ne estas certe bezonè paroli en ĉi tiu loko pri la terura politika sorto de la pola gento, gento, kiu perdinte sian multcentjaran memstarecon kaj liberecon, tamen sukcesis krei admirindan kulturon kun sia nobla literaturo, pentrarto kaj vivo.

Malpli konata estas la dua gento, Hebreoj, kiuj plejparte parolas germanan dialekton (kun slavaj kaj hebreaj elementoj), kvankam ili ne estas germanoj, kiuj portas la gloran nomon „Hebreoj“, kvankam ili, laŭ multaj sciencaj opinioj, ne estas posteuloj de la antikva gento palestina. „Rusaj kaj polaj Hebreoj“ skribas ekzemple antropologo Krzywicki, „posedas ĉiujn signojn, kiuj atestas, ke en iliaj vejnoj cirkulas tute sama sango kiel en vejno de la enlanda loĝantaro; kaj se ni konsideras statistikon kranio metrikan, tiam ni ekvidos, ke ĉi tiu gento posedas pli da polaj kaj rusaj signoj, ol da hebreaj.“

La saman opinion esprimas ankaŭ Ikow, dirante, ke „rusaj Hebreoj devos esti fine forigotaj el la semida familio, kun kiu ili posedas nenion komunan.“

Ĉi tiu, el diversaj eŭropaj elementoj versimile deveninta gento, estas vera pario en la vasta rusa imperio. Ne posedante regnanajn rajtojn, ofte eĉ ne rajtojn nur homajn, ĝi revas pri landoj kaj tempoj pli belaj, pri pasinteco kaj estonteco, ambaŭ en brilaj koloroj aperantaj, pri alveno de iu, kiu savos ilin el ĉi tiu nuna malinda stato, revas pri la sama savonto, kiun ankaŭ vokas kaj atendas la pola gento, kiu ideo preskaŭ plenigas la tutan polan arton, precipe poezion. Nenie en la mondo estas la kredo je alveno de

Mesio tiel disvastigita, kiel inter ĉi tiuj du malfeliĉaj gentoj, Poloj kaj Hebreoj.

Granda malliberejo kun ĉiuj siaj teruraĵoj, sed ankaŭ kun ĉiuj siaj sonĝoj kaj esperoj estas ĉi tiu regiono, kie estas lokita la naskiĝurbo de nia Majstro.

Nenie en la nuna mondo troviĝas pli favora loko por la ĉie konata floro, kies nomo estas Espero.

Kie troviĝas doloro — kaj kie ĉi tiu ne estas? — tie ankaŭ neatendite elkreskas el homaj koroj ĝia sanga fratino: La Espero, sed ĉi tie, sur la malfeliĉaj kampoj de okcidenta Rusujo, ĝi posedas plej fajrajn kaj plej ĉarmajn kolorojn.

Nur en similaj regionoj naskiĝas tuta mondo de feliĉigontaj ideoj, kaj nur en tia loko povis ekvidi la lumon de nia malgaja mondo la enkorpiĝo de ideo, nia lingvo internacia, kun sia bela nomo deveninta de la Espero.

* * *

Tute vive mi rememoras jenan tempon, kiam mi legis ie en unu el niaj gazetoj, ke ie en Rusujo aperis ree nova lingvo internacia. Kiom miloj da homoj legis ĉi tiun kaj similan sciigojn! Simile al miloj (eble milionoj) da aliaj homoj mi tra legis ĉi tiun modestan, eble eĉ kun iom da ironio raportitan sciigon, kaj ree mi iris mian propran vojon tute ne zorgante, eĉ tute ne sciante, ke la tago, kiam aperis unua broŝuro pri Esperanto estas historia tago, efektive tago de unua rango.

Tamen ĉu ne estas la sama ĉe ĉiuj grandaj homaj kaj historiaj okazintaĵoj?

Ofte la lumo de la naskiĝanta ideo estas tiel brila kaj akra, ke homoj blindigitaj ĝin ne povas vidi, ofte male ĝi estas simpla malgranda kaj sensignifa, ke atestantoj, eĉ plej proksimaj ĝin tute ne rimarkas.

Al ĉi tiu dua kategorio apartenis ankaŭ la naskiĝo de nia lingvo, kaj simile al ĉiu granda homa okazintaĵo oni jam nun, nur post unu kvarono da centjaro, nescias precize kaj certe ĝian daton.

Efektiva ĥaoso estas la opinioj pri la naskiĝtago de nia lingvo, t. e. pri la tago, kiam estis eldonita la unua libreto, kies aŭtoro estis D-ro L. L. Zamenhof, kaj kiu ĝin eldonis sub la pseŭdonimo D-ro Esperanto.

La Majstro mem en sia jam menciita „Letero pri la deveno de Esperanto“ skribas: „Fine post longaj klopodoj, mi prosperis mem eldoni mian unuan broŝuron en julio de la jaro 1887“, kaj D-ro Mybs en sia artikolo pri „La familio Zamenhof“ en „La Bela Mondo“ precizigas la tagon skribante: „La 21^{an} de julio aperis la unua Esperanta verketo“.

Tamen jam en la jaro 1907 oni komencis dubi pri la menciita tago, kaj ekzemple en la gazeto „Lumo“ sub la rubriko „Kio ajn“ ni trovas, ke la redakcio faris ian enketon pri la dato de apero de la unua libreto de D-ro Zamenhof, kaj ĝi konstatis, ke krom la libro portanta la daton 21 julio 1887 ekzistas pli malnova kun surskribo sur la dua paĝo de l'kovrilo: Permesite de l' cenzuro, Varsovio, 21 majo 1887. La tago de la oficiala naskiĝo de Esperanto estas do ĝuste du monatojn pli frua, se ne estas en tio ĉi ia eraro, rimarkas la gazeto.

En simila senco, multajn jarojn post sia menciita letero pri deveno de Esperanto, skribas D-ro Zamenhof, „ke la elektita dato (21 julio) ne estas ĝusta kaj devos esti alia envenontaj jaroj“.

Kiam poste plenumante la decidon de la Tria kongreso (1907) oni elektis komitaton por proponi daton por la tutmonda festotago, tiam la Majstro sciigis, ke laŭ lastaj esploroj faritaj de li mem, montrigis, ke la dato, en kiu la unua libro pri Esperanto ricevis la cenzuran permeson, estis ne la 21^a de julio, sed la 2^a de junio (21^a de majo

laŭ la rusa kalendaro). Adam Zakrzewski en sia artikolo „Historiaj detaloj“, aperinta en *Univervo* 1910 opinias, ke la dato de la aprobo de ĉi tiu libro estas 21^a de majo (t.e. 1^a de junio) kaj aldonas: „Mi citas datojn de cenzeno, ĉar precizan tagon de eliro el presejo estas jam neeble difini. La presejo Istomin en Varsovio ne ekzistas jam de dek jaroj.“ Nu, estu la dato tiu ĉi aŭ alia, certe benata estas la tago kiam

En la mondon venis nova sento

en la formo de simpla, malgranda broŝuro kun rusa titolo: D-ro Esperanto. Lingvo internacia. Antaŭparolo kaj plena lernolibro. La libreto aperis en Varsovio, kie tiam loĝis D-ro Zamenhof.

Mi ne estas tiel feliĉa posedi ĉi tiun historian kaj jam nun multekostan broŝureton; mi ĝin eĉ neniam vidis; tial ni aŭdu kion diras Marie Hankel en siaj „Sableroj“ pri la germana eldono de la sama broŝureto, aperinta ankaŭ en jaro 1887:

„Mi posedas unu el la nun tre maloftaj germanaj ekzempleroj, kompreneble ankaŭ la titolo estas germana. La antaŭparolo estas la plej granda parto de la libro, ĝi enhavas 19 paĝojn. Ĝia traduko esperanta sin trovas en la „Fundamenta krestomatio“, paĝ. 241. Sekvas nun 6 provoj de la nova lingvo: Patro nia, El la biblio, Letero (prozo) kaj Mia penso, En sonĝo, Ho mia kor' (poezio). Nun pluaĵn 8 paĝojn de germana teksto pri la disvastigado de la estonta lingvo, kaj aro da aldonitaj blankkartoj kun la promeso lernvoli la lingvon. Fine ni trovas la ĉefaferon, paĝo 43 ni legas:

Plena lernolibro de la Internacia lingvo. La „plena lernolibro“ estas nenio alia ol la 16 reguloj de nia fundamento! Nenia gramatiko, nenia sintakso. Sur malligita folio ni cetere trovas la vortaron, 900 vortojn. Tio estas ĉio! El tiu ĉi ĝermo la fera arbo de nia lingvo elkreskis, ĝi do efektive ĉion enhavas, kio estas necesa por lingvo internacia.“

Kortusaŭntaj estas la vortoj de la aŭtoro, kiam li komencis pensi pri la publikigo de sia multejara laboro, kiam li, vane serĉante la eldoniston, renkontis la maldolĉan praktikon de la vivo. „Fine“ skribis li en sia letero al N. Borovko, „post longaj klopodoj mi prosperis mem eldoni mian unuan broŝuron en julio de la jaro 1887. Mi estis tre ekscitita antaŭ tio ĉi; mi sentis, ke mi staras antaŭ Rubikono kaj ke de la tago, kiam aperos mia broŝuro, mi jam ne havos la eblon reiri; mi scias, kia sorto atendas kuraciston, kiu dependas de la publiko, se tiu ĉi publiko vidas en li fantaziulon, homon, kiu sin okupas je „flankaj aferoj“; mi sentis, ke mi metas sur la karton tujan estontan trankvilecon kaj ekzistadon mian kaj de mia familio, sed mi ne povis forlasi la ideon, kiu eniris mian kapon kaj sangon, kaj — mi transiris Rubikonon.“

Ĉu estus eble per aliaj vortoj skizi la teruran animan emocion de l'elpensinto, ol per ĉi tiuj el plej profunda profundo de lia koro elrintaj ekkrioj kaj sopiroj?

Ĉion li metis sur la altaron de sia lin de plej infaneco persekutanta sonĝo kaj ideo, li oferis tutan sian junecon, tempon, kiam aliaj ĝuas per ĉiuj siaj sentoj kaj nervoj la vivon kaj la printempon; nun li eĉ riskis sian tutan estontecon, ĉar de l'gloro kaj sukceso estas nur malgranda paŝo al ridindeco.

Ne, liaj antaŭsentoj ne estis superfluaĵ kaj senmotivaĵ. La vivo en ĉi tiu okazo tute ne estis avara; ne ekzistis doloro, kiun li sur posta vojo ne estus renkontinta, ne mankis eĉ la plej akra doloro — la perfido de plej bona kaj plej brava kunhelpanto kaj amiko.

D-ro STANISLAS SCHULHOF (Pardubice).

LA DEKA KONGRESO

La Pariza Organizaro fervore kaj vigle laboras por la pretigo de la venonta Kongreso, kiu anonciĝas sub bonaj aŭspicioj. Regulajn informojn pri ĉiuj kongresaferejoj enhavas la *Kongresa Gazeto*, kiu komencos aperi dum januaro. Dume, S-ro R. C. Pichon, la konata laŭreato de la Oratora Konkurso en Bern, bonvolis sendi al ni kelkajn informojn pri la venonta Kongreso.

La Kongreso okazos en „Gaumont-Palace“. La „Gaumont-Palace“ (Palaco Gaumont) staras en Montmartre, ĉe *place Clichy*, unu el la plej facile alireblaj punktoj en Paris.

Ĝia ĉefa salonego entenas 6500 lokojn, laŭ unu parterego kun loĝioj kaj du etaĝoj. La scenejon okupos la estraro, la orĥestrejon — la gazetistoj.

Estos flankaj ĉambroj por la kongresaj oficistoj kaj la fakaj kunvenoj aŭ kongresetoj.

Ĉirkaŭ la salonego ringe disvolviĝas promenejo, kies pargedon — kiel en la tuta palaco — kovras mola tapiŝo Ĉe la muroj staras vestejoj. Estas bela salono kun floro. kaj mebloj laŭ stilo Louis XVI, bufedo, vendejo, ekspozicio.

Funkcia oficejo de la „Société générale“ potenca banko, por financaj servoj, kaj la Akceptejo por ĉiuspecaj servoj.

La loĝado en Montmartre aŭ *Quartier Latin* ne kostos kare, nur Fr. 2 por unu nokto kaj Fr. 5 aŭ 5.50 por unu nokto kaj la manĝoj (plej malaltaj prezoj).

La klopodoj por ricevi patronaron kaj monsubtenojn estis plej ofte sukcesaj. Aliparte la garantia kapitalo atingis ĉe la 25 novembro Fr. 46.300. Espereble estos, ke sur la francaj fervojoj la kongresanoj ricevos rabaton. Ĉe la landlimo ili trovos deĵorantajn Esperantistojn, kiuj helpas al ili por la dogano kaj liveros al ili ĉiajn informojn kaj eventuale la rabatilojn. En la Parizaj stacidomoj estos akceptejoj kaj same deĵorantoj.

Ĉar ni volas liveri nur certajn sciigojn, ni povas diri nur malmulton pri la programo. Unu tuta tago (merkredo plej verŝajne) estos speciale dediĉita al la fakaj kunvenoj. La morgaŭon oni difinis por la ekskurso al Versailles.

Okazos prezentadoj, oni povas esperi, de neeldonita teatraĵo de konata franca aŭtoro. Mi diras prezentadoj, ĉar oni ne ludos nur unu vesperon.

Ĉiutage okazos piedaj promenadoj laŭ gvidado de sperta Esperantisto. La tuta vidindajaro estos dividita en 5 aŭ 6 promenadoj, tiel ke ĉiu kongresano, plenuminte ilin ĉiujn, estos vidinta ĉion vidindan sen laciĝo, sen elspezo, kaj kun samideanaj.

Post la Kongreso oni povos ekskursi al la belaj Renesancaj kasteloj apud rivero Loire, per aranĝoj de la tiea Esperantista Federacio.

Nun jam mi ne havas ion por diri. Restas nur du aferoj, du konsiloj:

1^e Ke vi rapide aliĝu, ĉar malfacile estas starigi buĝeton sur necerta fundamento;

2^e Ke vi bonvolu klare skribi al ni (3, Place Jussieu) viajn dezirojn kaj proponojn, pere de la Kongresgazeto respondotajn. Ni ja faras ĉion eblan por forgesi nenium antaŭaranĝon, sed vi ne rajtos plendi, se ni ne liveros ion, kion vi ne petis!

RENÉ-CHARLES PICHON.

* * *

Al la supra artikolo ni deziras aldoni, ke la kvina Kongreso de UEA ankaŭ okazos en Paris samtempe kun la deka Kongreso de Esperanto. Dank'al speciala aranĝo kun la Loka Organiza Komitato, la posedantoj de la kongresa karto rajtos, sen plua pago, ĉeesti la kunsidojn de UEA kaj ricevi la Kongresan Dokumentaron de UEA. Nia Asocio povos do kongresi en same bonaj kondiĉoj kiel en Bern.

H. H.